# La III-a orienta fronto en sia 65-a jubileo: decida por la revolucia venko




Havano, mar 7 (RHK) La gvidanto de la Kuba Revolucio, Raúl Castro Ruz, kaj la unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, gvidis ?i-lunde la feston por la 65-a datreveno de la III-a Orienta Fronto "Mario Muñoz" en la Sierra Maestra.

La ?efaj gvidantoj parolis kun lokaj a?toritatoj kaj la lo?antaro. Ili memoris, ke la ribela komando estis malfermita de la tiama gerilanestro Juan Almeida Bosque (1927-2009), agnoskita kiel unu el la legendoj de kubaj bataloj.

Meze de la monta pinto, la ?efa en la nacia geografio, staras sur la Monto de Espero,  la ma?zoleo al la martiroj de tiu enklavo de la Ribela Armeo, inkluzive  de ?ia ?efo.

Kun 57 batalantoj kaj en areo de pli ol ses mil kilometroj, la gerila ta?mento prenis la nomon de la kuracisto en la atako kontra? la kazerno Moncada, farita de junaj revoluciuloj gviditaj de Fidel Castro Ruz, la 26-an de julio 1953 kontra?  la diktatoro Fulgencio Batista (1952-1958).

La Tria Fronto estis decida en la strategia koncepto por alfronti la ofensivon de la Batista Armeo, kiu kun proksimume 10,000 membroj intencis venki la ribelarmeojn kun potenca deplojo de viroj kaj rimedoj en la orientaj montoj.

Same, ?i estis decida en la agoj de la tiel nomata Operacio Santiago kaj en la bataloj kiuj ebligis la revolucian venkon, la 1-an de januaro 1959, anoncita tiun nokton de Fidel el la balkonoj de la Urbodomo en la koro de la urbo  Santiago de Kubo.

Fonto: PL

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/315855-la-iii-a-orienta-fronto-en-sia-65-a-jubileo-decida-por-la-revolucia-venko](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/315855-la-iii-a-orienta-fronto-en-sia-65-a-jubileo-decida-por-la-revolucia-venko)

**Radio Habana Cuba**